

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj: la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 2, N-ro 1 (7) : majo-junio 2009
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas.
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter.doumen@adsl4you.be

Redaktore...

Karaj Legantoj,

Printempo denove estas en la lando: la sunlumo plifortiĝas, la tagoj plilongiĝas, arboj kaj arbustoj kovras sin per tenera verdaĵo, multkoloraj floroj malfermas siajn kalikojn, la birdoj kantas. Estas kaŭzo por ni ĝoji pri la vivo kaj ĝui ĝin, malgraŭ ĉiuj problemoj.

Pasis jaro ekde kiam la unua numero de tiu ĉi revueto aperis. Kelkaj esperantistoj sendis al ni retadresojn de amikojn kaj konatojn, tiel ke tiun ĉi numeron ni povis sendi al 240 esperantistojn en Belgio kaj Nederlando. Ni ĝojas pri ĝia sukceso kaj estas feliĉaj povi havigi al ĉiuj legantoj legaĵon en la Lingvo Internacia, kio certe estas bezono por multaj.

En tiu ĉi numero vi trovas, krom la kutimaj novaĵoj, la unuan parton de serio da tekstoj verkitaj de D-ro Zamenhof mem pri sia vivo. Estas grave por ni bone kompreni liajn motivojn por povi korekte orientigi nian agadon. Legi lian lingvaĵon, kvankam pli ol centjara, ĉiam restas agrabla sperto. Ankaŭ aperas unuafoje parto de rakonto.

Denove mi deziras agrablan legadon al ĉiuj novaj kaj malnovaj legantoj. Ni ĉiam estas pretaj ricevi viajn rimarkojn kaj sugestojn.

Pieter Jan Doumen

Leteroj de D-ro L.L. Zamenhof (Brievan van Dr. L.L. Zamenhof)

Letero al A. Michaux de la 21.02.1905

Kara Sinjoro!

Vi petas, ke mi donu al Vi detalojn pri mi kaj mia vivo. Tre volonte mi tion faros, kiom mi povos, sed bedaŭrinde mi povos fari ne tre multe. Jen estas la kaŭzoj: por la estontaj generacioj mia biografio eble estos ne seninteresa, ĉar efektive mia tuta vivo, de la plej frua knabeco ĝis nun, prezentas unu konstantan kaj seninterrompan serion da diversaj bataloj:

a) *interne* en mi konstante interbataladis diversaj idealoj kaj celoj, kiuj ĉiuj estis por mi egale ordonaj, sed kiujn interkonsentigi estis ofte treege malfacile, kaj tio ĉi multe min turmentadis; b) *ekstere* mi ofte devis bataladi kontraŭ diversaj malhelpoj, ĉar neniam miaj idealoj apartenis al la idealoj en modo, kaj tial neniam mankis al mi mokantoj kaj atakantoj. Krom tio mi tre multe da jaroj faris grandajn kaj tre turmentajn klopodojn por la akirado de mia pano, kaj tiu ĉi batalado pri la pano tre venenis mian vivon. En la lastaj jaroj mi fine atingis tion, ke pano al mi ne mankas; sed ho ve, la longa batalado min tre lacigis, kaj nun, ne havante eĉ plenajn 46 jarojn, mi jam sentas min kiel homo 60-jara.



Pri mia interna batalado kaj pri miaj idealoj mi volus kaj povus rakonti al vi tre multe. Sed se, kiel mi jam diris, por la estontaj generacioj mia rakonto eble havus kelkan intereson, por la nuntempa generacio ĝi estus tute ne oportuna. Ĉar tuj en la komenco de mia rakonto mi devus necese raporti, ke mi estas hebreo, kaj ĉiuj miaj idealoj, iliaj naskiĝo, maturiĝado kaj obstineco, la tuta historio de miaj konstantaj bataladoj internaj kaj eksteraj, ĉiuj estas sendisige ligitaj kun tiu ĉi mia hebreeco. Mi neniam kaŝas mian hebreecon, kaj ĉiuj esperantistoj tion ĉi scias; mi kun fiereco alkalkulas min al tiu tiel antikva kaj tiom suferinta kaj batalinta popolo, kies tuta historia misio konsistas, laŭ mia opinio, en la unuigo de la nacioj en la celado al “unu Dio”, t.e. unuj idealoj por la tuta homaro; sed en la nuna tempo de la naciaj ŝovinismoj kaj de tre disvastigita antisemitismo, fari el mia hebreeco temon por publika parolado estus neoportune kaj povus malutili al nia afero. Kaj paroli detale pri mia vivo kaj pri la historio de

miaj ideoj sen konstanta ripetado de mia hebreeco estas preskaŭ neeble.

Se mi ne estus hebreo el la geto, la ideo pri unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo. La malfeliĉon de la homara disiĝo neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo el la geto. La necesecon de lingvo sennacia, neŭtrale homa neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo, kiu estas devigata preĝi al Dio en jam longe mortinta lingvo, ricevas sian edukadon kaj instruadon en la lingvo de popolo, kiu lin forpuŝas, havas samsuferanojn en la tuta mondo kaj ne povas kun ili interkompreniĝadi. Mi havas nun nek tempon, nek paciencon detale klarigi al vi la situacion de la rusaj hebreoj, kaj la influon de tiu ĉi situacio sur mian tutan celadon kaj bataladon. Mi nur simple diros al vi, ke mia hebreeco estis la ĉefa kaŭzo, kial mi de la plej frua infaneco fordonis min tuta al unu ĉefa ideo kaj revo – al la revo de la unuiĝo de la homaro.

Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo. La afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo – pri la tuta cetera parto mi ne ĉesas pensi kaj revii, kaj pli aŭ malpli frue (eble tre baldaŭ), kiam Esperanto jam ne bezonos min, mi elpaŝos kun plano, por kiu mi jam de longe preparas min kaj pri kiu mi ian alian fojon eble skribos al vi. Tiu ĉi plano (kiun mi nomas “Hilelismo”) konsistas en la kreado de morala ponto, per kiu povus unuiĝi frate ĉiuj popoloj kaj religioj, sen la kreado de iaj nove elpensitaj dogmoj kaj sen la bezono, ke la popoloj forĵetu siajn religiojn ĝisnunajn. Mia plano konsistas en la kreado de tia religia unuiĝo, kiu pace enprenus en sin kaj interpacigus en si ĉiujn ekzistantajn religiojn en tia sama maniero, kiel ekzemple regno pace enprenas en sin diversajn apartajn familiojn, devigante neniun el ili forĵeti siajn apartajn familiajn tradiciojn.

Sed se mia hebreeco naskis, fortikigis kaj obstinigis en mi la celon de unuiĝo de la homaro, tiu sama mia hebreeco ankaŭ kreis por mi diversajn malhelpojn sur mia vojo, aperigis ĉe mi konstantan internan bataladon, kiu ofte tre forte min turmentadis kaj lacigadis (inter alie tia interna batalado turmentas min tre forte en la daŭro de la lastaj 5 jaroj, dum kiuj mi devis ofte ŝanĝadi kaj reŝanĝadi la planon de mia ‘Hilelismo’, kaj ĝis nun mi ne venis ankoraŭ al ia definitiva kaj lasta decido).

Se mi ne estus hebreo, tiam mi povus min fordoni al mia revo tute kaj absolute; sed ĉar mi apartenas al popolo, kiu tiom multe suferis

kaj plejparte ankoraŭ nun terure suferadas (precipe en Rusio, kie la konstantaj ĝemoj de mia malfeliĉa, terure premegata kaj kalumniata popolo venas al mi la vivon), tial tre ofte turmentis min la penso, ke mi ne havas la moralan rajton laboradi por idealoj neŭtrale homaj, kiam mia popolo tiel multe suferas kaj havas por si tiel malmulte da batalantoj. Krom tio mi ofte ripetadis al mi: “Kiam hebreo laboras por la unuigo de la homaro, oni nur primokados kaj atakados lin; oni diros, ke li faras tion ĉi nur el egoismo, por depreni de la pli feliĉaj nacioj tiujn privilegiojn, kiujn ili havas en komparo kun la malfeliĉa kaj ĉie persekutata hebrearo. Fortigu la situacion de via propra popolo, donu al via popolo landon, lingvon kaj gloron, kaj nur tiam vi havos la rajton paroli pri unuigo de la popoloj, tiel same kiel pri socialaj reformoj povas sukcese paroli nur riĉulo, kiu ofertas, sed ne malriĉulo, kiu postulas.” Ĉiufoje kiam tiuj pensoj min atakis, vekigis en mi ambicio pri mia ĉiam persekutata kaj en ĉiuj rilatoj malfeliĉa popolo, kaj mi (pro amo al mia ĉefa idealo mem) fariĝis patrioto de mia popolo.

(*Daŭrigota*)

Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Francio 1: *Lingvokonfuzo sur altega nivelo –*

Ekestis granda konfuzo kaj konsterno en Israelo pro diro de Bernard Kouchner [kuŝner], la franca ministro pri eksterlandaj aferoj. Dum interparolado en la angla kun ĵurnalistoj de Haaretz (israela gazeto) S-ro Kouchner volis fakte elvoki la eventualecon de israela atako al Irano celanta malhelpi tiun landon ekipi sin per nukleaj armiloj. Por tio li uzis la anglan verbon “hit” (bati, frapi), kiun li prononcis kiel “eat” (manĝi). La franca ministro, kiu faris viziton al Israelo la pasintan dimanĉon esprimis sian grandan bedaŭron pro tiu tre malkonvena miskompreno, kiun kaŭzis lia fonetika konfuzo, per kiu la israela gazeto igis lin diri, ke Israelo “estus manĝonta Iranon, se tiu lando provizus sin per nukleaj armiloj”.

Francio 2: *Esperanto, lingvo de komerco –*

La bretono Olivier Clanchin, prezidanto de la firmgrupo Triballat, volas igi Esperanton lingvo de komerco. Komence de la nuna jaro la grupo akiris italan entreprenon. Ĉar la angla ne estas tiel evidenta por la francoj kaj la italoj, Clanchin decidis fari Esperanton la lingvon de komunikado en la grupo. Tial li fondis asocion kun la celo organizi lingvotrejnadon por la bretonaj kaj italaj teamoj per fulminstruo, por ke ili lernu la internacian lingvon. Ĉar laŭ iu

esploro oni lernas Esperanton dekfoje pli rapide ol la anglan, ĝi estas ankaŭ malpli multekosta. La trejnado okazas dufoje dum kvin tagoj kun tri francoj kaj tri italoj. La kurso okazas ĉiumonate alterne en Francio kaj Italio. La celo estas, ke ili kapablu paroli, prezenti sin, organizi rendezuojn, kaj labori kune en Esperanto. Tiel la promociantoj de la projekto celas demonstri, ke eblas, danke al Esperanto, starigi ene de kompanioj internaciajn teamojn kapablajn interkomunikiĝi alimaniere ol en la angla. Rezultojn oni vidos en la venontaj monatoj.

(Henri Masson)

Germanio 1: *Inaŭguro de oficejo en Berlino* – Multjara revo de la Germana Esperanto-Asocio (GEA) fine realiĝis: la 4-an de aprilo la GEA-prezidanto, d-ro Rudolf Fischer, povis senvaligi ŝildon, kiu atentigas, ke tie ĉi, en la Einbecker Strasse 35, Berlino-Lichtenberg, nun estas la nova tutlanda oficejo de GEA. Samtempe ankaŭ Julia Hell por la Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj Peter Kühnel por la Esperanto-Ligo Berlino senkovriligis pliajn ŝildojn, kiuj montras, ke ankaŭ tiuj du Esperanto-organizaĵoj hejmas en la sama loĝejo.

Per tio finiĝis grava etapo, dum kiu oni iom post iom renovigis la sufiĉe kadukan domon, kiun posedas la konata esperantisto Johano Pachter. Kiam antaŭ pli ol tri jaroj granda incendio detruis la tegmenton de la konstruata domo, ĉiuj revoj ŝajnis esti vanaj. Sed per obstina laboro Johano Pachter, Peter Kühnel kaj Martin Schäffer, la ĝenerala sekretario de GEA, tamen realigis la rekonstruadon, kaj oni eĉ povis alkonstrui plian tegmentan etaĝon.

Kune kun la inaŭguro de la berlina oficejo GEA ekhavis sian kvaran dungiton. Temas pri Henryk Wenzel, kiu rolos kiel oficejestro kaj transprenos multajn administrajn kaj informajn taskojn.

La financado de tiu kuraĝa elpaŝo de GEA estas sekurigita por iom pli ol unu jaro danke al la donackampanjo "mecenato serĉas mecenatojn", kiu havigis pli ol 14.000 eŭrojn al GEA. Krome la Fondaĵo Familio Fischer kontribuas ĉiujare ĉirkaŭ 1.200 eŭroj.

(Rudolf Fischer, prezidanto de GEA)

Germanio 2: *GVP subtenas Esperanton* – Ankaŭ la Germana Verda Partio (GVP) respektas Esperanton en sia aktuala eŭropa programo, danke al la membroj de la Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE). Ankaŭ la francaj AVE-anoj klopodas atingi la samon en sia lando. AVE sukcesis amendi la eŭropan programon de la Germana Verda Partio. Jen la traduko de la finfina versio de la ĉapitro pri kulturo:

"La kultura diverseco estas granda, kaj oni ne rajtas redukti ĝin al folkloro aŭ al protekto de merkataj nomoj kiel Kamemberto, Fetao, Hallumio. La bazo kaj la esprimo de la kultura multeco estas la diversaj lingvoj de Eŭropo, ne sole la lingvoj de la majoritataj socioj, sed ankaŭ de la minoritataj kiel Esperanto, la internacia lingvo de la interpopola komunikado. Plurlingveco estas forte subtenenda."

(Manfred Westermayer, AVE)

Usono – *Progresemaĵoj pri Esperanto* – Artikolo pri Esperanto, kiun verkis juna virino, Miranda Trimmer, sub la titolo "Enthusiastic Speakers Keep Utopian Language Alive" (entuziasmaj parolantoj tenas utopian lingvon viva), aperis en la progresema usona gazeto **UTNE Reader**, kiu pritraktas alternativajn politikojn kaj kulturon kaj novajn ideojn.

Spite al la aludo pri utopieco, kelkaj fraz(er)oj el ĝi povas vekti scivolemon, i.a. ligilo al la anglalingva parto de la multlingva informretejo esperanto.net (62 lingvoj), la frazo "*Imagi mondon liberan je komunikadaj bariloj*", la priskribo de Esperanto kiel densa internacia komunumo de parolantoj, libroj, kanzonoj, kongresoj (ligilo al la ĉi-jara UK en Bjalistoko) kaj ĉefe de la multaj eblecoj sur la interreto (i.a. Skajpo, Facolibro). En la lasta paragrafo la leganto estas invitita konsulti la anglalingvan version de Vikipedio pri Esperanto.

The Boston Phoenix publikigis "Excerpts from the MIT Esperanto Club's List of Useful Expressions in Esperanto", humuran artikolon kun esperantlingvaj esprimoj kaj ties angla traduko. La Esperanto-paĝo de MIT estas trovebla ĉe: <http://web.mit.edu/esperanto/>.

En **Alt Weeklies** (alia alternativa retejo de la asocio *Alternative Newsweeklies*) aperis artikolo sub la titolo "On American Campuses Esperanto is an Extracurricular Language (Esperanto estas esksterprograma lingvo sur la usonaj kampusoj)". Esperanto estas tamen oficiale instruata en kvar usonaj universitatoj!

(Neil Blonstein, Usono)

Brazilo 1: *Monda Socia Forumo* –

De la 26-a de januaro ĝis la 1-a de februaro 2009 okazis en Belém, Brazilo, la Monda Socia Forumo. Belém situas en la interno de Brazilo, kaj flugoj tien estas relative multekostaj. Kelkaj kuraĝaj esperantistoj tamen iris tien por videbli ni ajn emancipajn proponojn kaj praktikojn. Laŭ jam longa tradicio Esperanto montris sin tie kiel demokratia alternativo por pli egaleca lingva ordo, kompletigante la strebado de MSF al pli justa mondo. Oni vaste informis la publikon, kiu estis aparte konscia pri la ĝeneralaj valoroj al kiuj Esperanto ligas sin.

(Emilio Cid, San Paŭlo)

Brazilo 2: Propono instrui Esperanton –

La brazila senatano Cristovam Buarque prezentis en la senato proponon modifontan la Leĝon N-ro 9394 de la 20.12.1996, per kiu la libervola instruado de Esperanto en mezgradaj lernejoj de Brazilo estu permesata. Kiel multaj esperantistoj tra la mondo ankaŭ mi sendis al li gratulmesaĝo. Li sendis al mi jenan dankleteron: “Dankon pro via retmesaĝo. Mi kredas, ke ni faros grandan bonon al la junuloj kiuj elektis lerni Esperanton. Krom akiri la internacian lingvon, ili ankaŭ antaŭeniros al Paco. Se mi estus havinta tiun eblecon, mi bezonus peti neniun traduki tiun ĉi respondecon. Jam mi estas studanta ĝin por estontece mem traduki.”

(Henri Masson)

Ljudmila Novak respondas

(Ljudmila Novak antwoordt)

Ljudmila Novak, slovena membro de la Eŭropa Parlamento, respondas al demando de ĵurnalisto de la gazeto “Delo” (Ljubljana), Igor Bratož, pri la sorto de ŝiaj amendoj en EP favore al Esperanto.



“Estimata, mi ĝojas, ke vi interesiĝas pri ĉi tiu agadkampo. Pri la raporto pri plurlingveco ni voĉdonos en la Komitato por Kulturo morgaŭ inter la 9-a kaj la 10-a horo. Ĉar ankaŭ en EP pro nescio regas ankoraŭ granda rezisto kontraŭ Esperanto, mi ne atendas subtenon. Sed mi ne deziris forigi tiujn amendojn. Per ili mi deziris instigi ĉiujn parlamentajn grupojn al pripensado pri tiu ebleco en la estonteco. Kiel siatempe la enkonduko de la eŭro ŝajnis nebla, kaj nun ĝi tute bone funkcias, ni povus same pensi pri la uzo de Esperanto, kiu estas facila por lernado kaj uzado, sed antaŭ ĉio la uzantoj estus en egalrajta pozicio, ĉar ne temas pri la nacia lingvo de iu privilegiita popolo. La angla nuntempe transprenas la rolon de komuna komunikadlingvo, kio signifas la superregon de unu lingvo super la aliaj. Ĉiuj homoj ja ne estas same lingve talentaj, tial nur eta parto de la

popoloj bone regas fremdajn lingvojn. Britio gajnas pro la lingva avantaĝo ĉiujare plurmiliardajn profitojn, dum EU havas plurmiliardajn elspezojn. Kvankam mi mem batalas por la konservado de ĉiuj vivaj lingvoj kiuj estas uzataj en EU, kaj por la lernado de almenaŭ du fremdaj lingvoj, mi konstatas, ke ĉiam denove ni renkontas barojn rilate la komunikadon. Kompreneble, komuna lingvo ne anstataŭas la oficialajn lingvojn, sed nur plifaciligus la komunikadon en Eŭropo kaj en la mondo. Pri tio revis ankaŭ la patro de la internacia lingvo Esperanto, Ludvik Lazar Zamenhof, kiam li kunmetis tiun ĉi artefaritan lingvon. Se en EU oni akceptus decidon pri komuna komunikadlingvo per projekto de financado de lingvaj kursoj de Esperanto, oni povus dum mallonga tempo atingi grandan disvastigon. La lingvo havas tute simplajn kaj logikajn gramatikajn regulojn sen seceptoj. La vortoj baziĝas sur eŭropaj lingvoj, kaj tial ĝin facile komprenas tiuj kiuj jam lernis eŭropajn lingvojn. En kelkajn lernejojn en Anglio oni enkondukis la lernadon de Esperanto kiel eksperimento por lernigi fremdajn lingvojn kaj konstatis, ke per tiu lingvo oni pli facile lernas aliajn lingvojn.

Temas pri politika decido, kiu en la estonteco donus al Eŭropo novan forton kaj pligrandigus sian konkurenccapovon en la mondo. Sed por grandaj politikaj decidoj estas kutime necesa multa tempo, kuraĝo kaj volo de la plej potencaj agantoj. La vorto Esperanto signifas esperon, pri kiu ni scias, ke ĝi mortas la lasta.”

Ljudmila Novak

La Internacia Virina Tago 2009

(De Internationale Vrouwendag 2009)

Okaze de la Internacia Virina tago de UN 2009 en Hiroŝimo, ni, virinoj de Hiroŝimo havos kunvenon la 8-an de marto sub la temo: ‘Vivo kaj kulturo: protekti la vivon de la infanoj kaj kune vivi en familio’.

Kion ŝanĝi por la infanoj, homoj de la estonteco? La vivo de la infanoj, de la geknaboj estas minacata de milito kaj konfliktoj en la mondo sub ekonomia krizo. Ekde la jarfino de 2008 bombado atakis la loĝantaron de Gazo en Mezoriento, kaj viktimiĝis multaj infanoj. Nia koro doloras ĉe la raportoj pri Gazo sub la aeratakoj. Pro milito, konfliktoj kaj ekonomia krizo la rajtoj de la infanoj libere vivi estas forrabitaj. La vivo de la infanoj dronas en malstabileco pro diversaj kaŭzoj, pro altrudita laboro, sklavkomerco, neglekto kaj manko de

edukado. Ni, virinoj, havas la grandan deziron protekti kaj flegi la vivon de la infanoj. Ĉi-jare, ni, virinoj el Hiroŝimo, internacie alvokas la tutan mondon al paco, interŝanĝante mesaĝojn de solidareco tutmonde.

Ĉi-jare ni, el la atombombita Hiroŝimo, alvokas vin pensi kaj diskuti pri nia temo, por ke ni kune kun vi povu konstrui vojon al prospera vivo por la infanoj estontece. Ni luktu en ilia loko en soldareco kun vi.

(*S-ino NOBUMASA Tiekō*)

Gramatikajo: la artikolo (2)

(*Spraakkunst: het lidwoord (2)*)

B. Oni ne uzas la artikolon:

1. Se la substantivo estas nedifinita.

Li acētis gazeton.

Antaŭ nia domo staras arbo.

Bona libro estas bona amiko.

2. Antaŭ materinomoj en ĝenerala senco.

Fero estas malmola metalo.

Parolo estas arĝento, al oro similas silento.

Mi ne faros tion por la tuta oro en la mondo.

3. Antaŭ abstraktaj nomoj (gevoelens, sentoj, kvalitoj, malsanoj ktp.) sen komplemento.

Li havas gripon / kapdoloron / febron.

Ŝi havas la malsanon de Parkinson.

Amo estas agrabla sento.

Saĝeco estas malofta virto.

La saĝeco de Sokrato.

Rimarko: Antaŭ abstraktaj nomoj uzataj en ĝenerala senco oni tamen ofte uzas la artikolon.

Ne laŭdu la tagon antaŭ la vespero.

La vivo finiĝas per la morto.

La dormo estas la bildo de la morto.

4. En difinoj kaj la demando pri ĝi, kaj kiel predikativo sen komplemento.

Kio estas atomo?

Dianto estas floro.

Mia patro estas ŝoforo.

Li estas la frato de mia edzino.

5. Inter du prepozicioj en pli-malpli fiksitaj esprimoj.

de mateno ĝis vespero

sur bazo de akvo

je memoro al la mortintoj

kun helpo de la polico

6. En denombro.

Viroj, viroj, infanoj, ĉiuj peris en la maro.

7. Oni ne ripetas la artikolon antaŭ la dua de du substantivoj kiuj estas pli-malpli sinonimoj aŭ rilatas al la sama persono; la samo validas por adjektivoj kiuj staras antaŭ substantivo.

Sonjoro Delat estas la proprietulo kaj direktoro de la fabriko.

la unua kaj plej grava tasko de la asocio

la prezidanto kaj sekretario de la klubo

la prezidanto kaj la sekretario de la klubo

La (ne)uzo de la artikolo antaŭ propraj nomoj estos pritraktata en la sekvanta numero.

Aktivajoj de LEA

(*Activiteiten van LEV*)

Aktivajoj dum la du pasintaj monatoj

1. Merkredon, la 25-an de marto 2009, nur du personoj prezentis sin por la kantovespero.

Ĉar ili ne ŝatas kanti en dueto, la kantovespero ne okazis. Ili tamen estis seniluziigitaj pro la dizerto de la kutimaj ĉeestantoj. La kaŭzoj por ilia foresto estas verŝajne du: la nekutima tago kaj la nekutima loko. Tial la estraro decidis estontece okazigi ĉiujn kunvenojn de LEA la lastan jaŭdon en la kultura centro Poorthuis de Peer. Do la sekvanta kunveno okazos jaŭdon, la 30-an de aprilo.

2. Ĉar jaŭdo, la 30-a de aprilo 2009 ankoraŭ ne pasis, sed ĉiam estas okazonta kiam mi skribas tiujn ĉi liniojn, ankaŭ ne eblas raporti pri ĝi., Dum tiu kunveno ni ludos, kiel estas planite, skrablon sub gvido de An Olijslagers per ludilo speciale adaptita al Esperanto de An mem. Ĉiuj membroj de LEA estas tutkore bonvenaj!

B. Aktivajoj dum la du estontaj monatoj.

1. Jaŭdon, la 28-an de majo 2009:

Kartludado en kafejo 'Esperanto' en Eisden (Maasmechelen).

2. Jaŭdon, la 25-an de junio 2009:

"Kion vi legis lastatempe?" gvidota de An Olijslagers kaj Jan Doumen.

Rakonto (verhaal):

De kie venas la kiskidioj?

(*Van waar komen de Kiskidi's?*)

Usono 1850... Estis la epoko de la granda sturmo al Okcidento. Du jarojn antaŭe oni malkovris oron en rivero en Kalifornio. Fantaziaj legendoj asertis, ke, por havigi ĝin al si, oni bezonas nur klini sin kaj pluki ĝin de la grundo. Pluraj dekmiloj da aventuristoj, obseditaj de la tiel nomata orfebulo, migris al Kalifornio, esperante rapide riĉiĝi.

Tiu iluzio altiris ankaŭ multajn eŭropanojn. Senĉese ili amase elŝipiĝis en New-Orleans, de kie ili migris laŭlonge de Mississipi al Saint-Louis. Post tio ili iris al Independence en Kansaso, de kie ili veturis kun siaj familioj en longaj karavanoj de tendoĉaroj tra sovaĝa kaj malamika lando en la direkto de New Eldorado, trairante plurajn milojn da mejloj. Ofte la indianoj, kiuj ne amis tiujn fremdajn entrudiĝantojn, furioze atakis la karavanojn, tiel ke multaj enmigrintoj mortis antaŭ ol vidi la promesitan landon.

Sed ne ĉiuj iris al Kalifornio. Ankaŭ la vastaj, novaj teritorioj de Mez-Okcidento altiris sennombrajn entreprenemajn pionirojn. Tiel la juna familio Barlow aliĝis al longa karavano de tendoĉaroj kaj migris okcidenten en la jaro 1855, serĉante novan hejmon, feliĉecon kaj prosperecon en la senmezura nekonata teritorio situanta trans Mississipi. Ili estis agrikulturistoj kaj tre bone sciis, ke dura laboro ofertas pli da sekureco en la vivo ol fantazia oro. Tial il ne transmigris la Rokajn Montojn, sed establis sin en la ebenaĵo laŭlonge de la suda bordo de Missouri kaj kulturebligis terenon en la ĉirkaŭaĵo de ilia simpla 'ranĉo', kiun ili mem konstruis el arbotrunkoj kaj pajlo. Ili devis dure laboradi de la frua mateno ĝis la malfrua vespero por vivteni sin, sed ili estis kontentaj pri sia sorto.

La patro de la familio, Charles Barlow, estis forta kaj diligenta viro. Lia edzino Béatrice, de franca deveno, brave helpis lin ĉe liaj laboroj. La geedzoj havis filon, Richard, kiu, kiam tiu ĉi evento okazis, estis ĉirkaŭ dekdujara, aĝo je kiu oni tiutempe jam ne estis infano, sed ankoraŭ tute ne plenkreskulo.

Iun printempa posttagmezon, kiam Richard estis sola hejme, Tommy, simpatia najbarknabo, venis al la ranĉo de la familio Barlow kun grava novaĵo, kiu evidente multe ekscitis lin.

“Richard, en la ĉirkaŭaĵo de la Nigraj Rokaj apud Missouri haltis karavano por pasigi la nokton. Ili ne estas grandnombraj kaj parolas fremdan lingvon.”

“Kiuj ili estas?”

“Mia patro diras, ke ili estas kiskidioj.”

“Ĉu kiskidioj? Mi neniam aŭdis tiun nomon. El kiu lando ili venas?”

“Mi ne scias. La patro ne menciis la nomon de la lando, sed eble estas Kiskidio.”

“Ne ekzistas tia lando laŭ mi. Devas esti ia stranga eta tribo. Ĉu vi jam vidis ilin?”

“Jes. Mi ĵus revenis de tie.”

“Ĉu ili estas blankuloj aŭ nigruloj?”

Post nelonge aperos sub la titolo
RENARDO VULPO

la Esperanta traduko de la fama flandra bestepopeo “Van den Vos Reynaerde”, verkita ĉirkaŭ 1250 de nekonata poeto.

En tiu populara mezepoka literatura majstroverko la poeto rakontas, kiel la ruza vulpo trompas la aliajn bestojn de la arbaro. Komdamnite al la morto pro siaj multaj krimoj, li tamen sukcesas elturniĝi el tiu senespera situacio, trompante reĝon Noblo Leono. Pieter Jan Doumen tradukis tiun verkon esperantlingven en 4.140 blankaj versoj, provizante ĝin per enkonduko kaj klarigaj notoj. La libro, ilustrita per pluraj akvofortoj de konata germana desegnisto enhavas 164 paĝon.

Prezo: € 15,00 + sendokostoj.

Havebla post nelonge ĉe la tradukisto.



“Ili ne estas tute blankaj, sed ankaŭ ne nigraj. Ili havas korvonigrajn harojn kaj barbon kaj ne estas tre grandaj. Nu, Richard, mi devas foriri. Ĝis revido.”

“Jam?”

“Jes, mi volas iri rakonti la novaĵon al la aliaj najbaroj. Ĉu vi ne venas kun mi?”

“Mi ne povas. Mi devas gardi la ranĉon kaj fendi hejtlignon.”

Tommy saltis sur sian ĉevalon kaj malaperis en nubo de polvo. La proksima najbaro loĝis je kalkaj mejloj de la familio Barlow. Ĉiuj loĝantoj de la regiono loĝis tre malproksime unuj de la aliaj kaj vidis sin nur tre malofte. Kaj ĉar ilia vivo estis tre monotona kaj soleca, ili kutimis informi sin reciproke, se io grava aŭ interesa okazis en ilia regiono. (Daŭrigota)